# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024: 16; aprilo 15.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sume 300 KB.


## Pretas la retejo de la Hispana Kongreso de Esperanto

La 82-a Hispana Esperanto-Kongreso okazos ĉi-jare en la valencia urbo Cheste, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2024. Cheste situas je ĉirkaŭ 30 kilometroj de la urbo Valencio, kaj havas gravan rilaton kun Esperanto, ĉar historie ĝi havis unu el la plej altaj proporcioj de parolantoj de la internacia lingvo rilate al la loĝantaro. Eĉ du stratoj havas nomojn de esperantistaj aktivuloj. La specifa kongresej estos la impresa Eduka Komplekso, kie eblos ankaŭ loĝi.

Ni jam laboras super la kongresa programo, kiu havos gravan kulturan komponanton, sed ankaŭ distran kaj turisman partojn, kaj la eblon praktiki Esperanton kun prelegantoj el Hispanio kaj aliaj landoj. Komencantoj ne devas timi pro la nomo *Kongreso*: ĝi estas renkontiĝo, en kiu povas partopreni kaj ĝui ĉiu Esperanto-parolanto, sendepende de sia lingvonivelo. Krome, precipe por vizitantoj venantaj el malproksimaj lokoj, estas planata ampleksa post-kongresa programo, kun vizitoj al diversaj lokoj de la valencia regiono, gvidataj de lokaj esperantistoj. Jam disponeblas la kreskigota retejo de la Kongresoj. La aliĝilo estas inkluzivigita en ĝi. Estas aliĝperiodo kun reduktita kotizo ĝis la **30-a de aprilo**, kiu estas speciale malalta por eksterlandanoj. Profitu kaj rezervu vian lokon.

## Renovigita la retpaĝo ESPERANTO.ES

La retejo de HEF estas renovigita. Restas detaloj poe perfektigi, se vi trovas ion ŝanĝindan, skribu al <esperanto@esperanto.es.>

## La scienca kalendaro 2024 en la retejo

Troviĝas en la reto la scienca kalendaro 2024 de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado  (CSIC). Vidu ĉe: https://digital.cisc.es/handle/10261/34 1369.

Fonto: Bitbulteno 93.

## Litovio gastigos la Junularan Kongreson  (IJK)

Plaĝo, arbaro, hamakoj, koncertoj kaj esperantistoj -- nur en la 80-a IJK, kiu okazos en Žemiau, de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto! . Aliĝu nun kaj estu parto de la plej mojosa esperanta evento! La unua aliĝperiodo estas mallonga, do ne hezitu!

Aliĝilo: https://ijk2024.tejo.org/alighilo. Pli da informoj pri IJK: https://ijk2024.tejo.org



El Penseo 390

Chen Yi (1901-1972)

Sub neĝa amaso terura,
sin pino rektigas kun belo;
La arbo sin montros alt-pura,
kredeble nur post fordegelo.

## Luma estonteco en Kanado


Aperis la nova numero de *Lumo* 2024 – la revuo de Kanada Esperanto-Asocio kaj Eo-Societo Kebekia. Ĝia enhavo estas bunta: rakonto pri tio, kiel oni vivas dummilite en Ukrainio, raporto pri vizito al Koreio, eble nekutima aliro al la demando de Esperanto kaj lingva diverseco. Aperas en tiu ĉi numero du poemoj de Marjorie Boulton, kies 100-jara datreveno okazos en 2024. Unu el tiuj poemoj estas forgesita kaj retrovita poemo, kiu ne aperis ĝis nun. Kaj pluraj pliaj artikoloj kaj informoj! https://esperanto.ca/wp-content/uploads/2024/04/Lumo_2024_1.pdf

Ni invitas vin al la Kanada Virtuala Kongreseto - KVaK-7. Temos pri la memoroj pri la unua UK en Kanado kaj nur unu el kelkaj en Nord-Ameriko: Vankuvero 1984. Venos pluraj personoj, kiuj organizis kaj partoprenis la eventon. Venu informiĝi, se vi ne partoprenis. Ne maltrafu la prelegon, konversacion, la muzikon, la sperton. Dankon al Alekso Miller pro la reklamo: https://www.youtube.com/watch?v=SLGAqNcUkM0

Pluraj numeroj de *Lumo* estas disponeblaj senpage al la legantoj en la retejo de Kanada Esperanto-Asocio: https://esperanto.ca/lumo/

Ĵenja Amis, la redaktoro

## Brazila Muziko




Temas pri videoj produktitaj de **Brazila Kolekto** (studiaj aŭ hejmaj), kiujn pro aŭtorrajtaj kialoj oni ne rajtas publikigi en la retejo. Do, oni lasas nur ĉ. unuminutan parton spekteblan en la malfermita jutuba kanalo, kaj la kompletan videon oni disponigas nur en **BrazilMuzika Klubo**, kiu estas ekskluzive por la abonantoj.

La novaj videoj kiujn la klubanoj povas spekti ekde tiu ĉi semajno estas: *Plena je ĉarm'*, traduko farita de **Mikel Klav** el la fama komponaĵo de **Guilherme Arantes**, originale *Cheia de charme*. La videon registris la tradukinto mem, per interesa klavara muzik-aranĝo.

## Intense por interlingvistoj

Nun haveblas numero 127 de *Informilo por Interlingvistoj*

https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2024/04/IpIProg.pdf
IpI kaj IfI estas eldonitaj de Esperantic Studies Foundation (ESF) kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ili disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por universitatanoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj temoj.

Artikoloj en IpI ĝenerale nun aperas pli frue en la blogo ESF Connected. Ĉiu numero arigas artikolojn kaj novaĵojn el la antaŭaj tri monatoj de tiu blogo.

Antaŭaj numeroj: https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/

## Bahama afiŝo de Leoni




En Bahamoj, s-ano Ricardo Herrera prelegis pri Esperanto dum la lingvo-semajno.

Sendis la informon: prof. Leoni Leoni


## Esperanto en Socia Forumo

La teamo, kiu okupiĝis pri reprezentado de UEA ĉe la Monda Socia Forumo, konsistanta el junaj nepalaj esperantistoj, nun deziras stabiliĝi kiel nepala esperantista NRO-o okupiĝanta pri Esperanto kaj homaj rajtoj en Nepalo. Ili bezonas 400 eŭrojn por povi registriĝi kiel NRO-o kaj komenci agadi. Se vi povas helpi, ankaŭ per malgranda sumo, bonvolu sendi vian kontribuon al la uea-konto de Mireille Grosjean, <mirg-v> laŭ viaj kutimaj pagmanieroj al UEA.

## Venezuelo vekiĝas

Post paŭzo de ses jaroj, Venezuela Esperanto Asocio (VEA) okazigis kunvenon en sia sidejo. Partoprenis fizike kvin membroj kaj rete pliaj kvar. VEA decidis komenci Esperanto-kurson en la sidejo la 13-an de aprilo. Tio okazas post sukcesa kurso okazinta en Pampanito, en la centro de Venezuelo, instruita de Jose Perez. La Amerika Komisiono gratulas la landan asocion VEA pro tia revivigo.

Sendis Guy Matte, la kunordiganto de la Amerika Komisiono




## Nova vortaro por grava okcident-afrika lingvo

**Vortaro haŭsa-Esperanto kaj Esperanto-haŭsa,** de Sergio Baldi estas eldonita de Mondial. Jen la unua vortaro en Esperanto pri okcidentafrika lingvo. Krom la dudirekta vortaro enestas ankaŭ prezentoj de la du lingvoj kaj originala rakonto en la haŭsa kaj ĝia traduko en Esperanto. Prezo: € 22.50. Akireblas pliaj informoj kaj reta mendilo ĉe *:* https://katalogo.uea.org?inf=6746

## Facila vento – La etoso de retoso

https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/retoso-2024-r423/

## Universitata retkunsido

La kunveno estis interesa pro la enhavo. Radojica Petroviĉ klarigis la unuajn rezultojn de la enketo inter esperantistoj farita kunlabore kun la fakultato pri filozofio de la universitato en Beogrado. Rigardu la registraĵon de la kunveno por vidi la montritajn rezultojn, kiuj konfirmas ke la aĝo en kiu oni lernas Esperanton varias de 15 al 30 jaroj. do, oni direktu la informadon al tiu aĝo-grupo:

https://us02web.zoom.us/rec/share/zJD276zBBFUtjeucaEeZI9XtXjNc2Sc2_L0mv1Ib7IN4ZesifiC-XvCLS-au6jE1.hLCi5hrKqig4u3kW

Estis anonco pri nova kurso en la Universitato de Stanford en Usono kaj kvar novaj kursoj en la universitato de Teherano [du retaj kaj du ĉeestaj]. La registraĵo de la Kunpensigado pri Esperanto en Universitatoj spekteblas en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=ku-WucJZQqk.

## EKU per EKO – uzu informojn de ĝenerala intereso

Kial ne uzi erojn el la EKO-komuniko por kontribui al nia informa laboro? Elektu novaĵon, kiu kaptos la intereson de la legantoj de iu retejo aŭ revuo. Traduku la tekston al via lingvo, aldonu ion pri via propra movado (ekzemple pri baldaŭa kurso) kaj sendu ĝin al gazeto – povas esti eĉ loka gazeto, kiu ofte volonte ricevas bone redaktitajn tekstojn. Iom post iom starigu rilatojn kun ĵurnalisto aŭ reta eldonisto!

========= vortoj: 970 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)




La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj dek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU aŭ SUBTRAHU vin:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigok, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.